

Nikolaus Lenau,

## La nokta vento

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La nokta vento ĉesintas  
 Susuri tie ĉi,  
 La birdo ekripozintas  
 Kviete apud ni.

La fora, febla fonteto -  
 Ĉar mutas tie ĉi -  
 Aŭdeblas en la kvieto,  
 Flustranta estas ĝi.

Nun, kiam ĉio silentas,  
 Mallaŭta rememer'  
 Vekiĝas - tion mi sentas -  
 Plorante en la for'.<sup>2</sup>

Ke devas ĉio foriĝi,  
 Konata estas ĝi.  
 Aĥ, se nur povus mildiĝi  
 Anim-dolora ĉi!

*Traduko de la Germana poemo "Der Nachtwind" de NIKOLAUS LENAŬ (\*1802-08.13 - †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982.*

*MR-161-1 / Arg-674-1355 (2012-11-24 12:35:05)*

---

<sup>2</sup>aŭ:

Revenas la memoro  
 Mallaŭta kun sonor'  
 El la profunda koro  
 ploranta en la for'.